

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Asocia sidejo de S.A.T. kaj administrejo:

67 avenue Gambette, Paris 20
Redaktoroj: L. Bannier ĉe S.A.T., Parizo kaj Bas Wels la Wandeloorddwarsstraat 33 Rotterdam.

Eldonejo de SENNACIULO:
C. van Essen
Floretstraat 10, Rotterdam-Z.

La juda Problemo

La sadisma, eksterma movado de la nazioj kontraŭ la Judoj ne likvidis la judan problemon. Tiu problemo, kiu fakte jam naskiĝis en la tempo kiam la idoj de Izraelo enmigris la mondon, estas nun eĉ tiom grava, ke ĝi eble kondukos al la eksplodo de speco de milito. Tio cetere ne tre mirigas min, ĉar la mondo, jam nacie dividita, ne kapablas allasi novan nacion sen sanga batalado. Estas laŭ nacia vidpunkto tute nature, ke la Araboj ne toleras ke la Judoj, venintaj el diversaj landoj de la mondo, ricevas parton de Palestino por fondi tie fortan nacion.

Sed la juda problemo ne estas problemo nur pri tiuj, kiuj jam loĝas en Palestino. En Germanio vivas ankoraŭ multmiloj da Judoj. Nur en la Brita zono troviĝas ankoraŭ 23.000 Judoj en internigejoj, el kiuj tiu de Bergen-Belsen kun 11.000 enloĝantoj estas la plej grava. Tia internigejo estas juda ŝtato, moderna „geto“, apartigita de la cetero de la Germana popolo. La Judoj rajtas forlasi la kampejon sed ili mem portas la respondecon pri si mem. En tiu moderna geto la plimulto el la Judoj revas pri Palestino; 85 % sopiras iri tien; nur 15 % preferas Amerikon aŭ Aŭstralion, ĉefe se ili havas tie parencojn.

La vivo en tiuj internigejoj certe ne estas ideala; tamen la Centra Komitato tion faras por plialtigi la spiritan nivelon ĉe la Judoj. En Bergen-Belsen estas gimnazioj, popollernejoj, religiaj lernejoj, metilernejoj, sportkluboj, hospitaloj ktp. Multaj internigitoj posedas ĝardeneton, kie ili okupas sin pri la agrikulturo. Sed la Judoj kategorie rifuzas kunlabori je la rekonstruo de la Germana industrio. Ili neniel deziras helpi la popolon, kiu kaŭzis al ili tiom da ĉagreno k larmoj k kiu nun ankoraŭ ŝutas la semojn de l' rasmalamo inter proprajn membrojn k tiujn de la okupanta potenco.

Sed ankau la humanecaj proponoj de Nederlando k Danio (oni invitis difinitan nombron de fakuloj) ne trovas grandan simpatian ĉe la Judoj. Ili deziras „definitivan solvon“ de la problemo: propra lando, Palestino.

Mi tufacile povas kompreni, ke la teruraj rezultoj de la Hitlera antisemitismo

kaŭzis ĉe la Judoj plifortiĝon de la emo al propra lando. Tiu emo jam antaŭ Hitler ekzistis ĉe kelkaj, sed la plimulto el la Judoj, loĝantaj en Eŭropo aŭ Ameriko, preferis resti inter la popoloj, kun kiuj ili vivis, ĝuis k suferis. Precipe en okcidenta k meza eŭropo, kie la Judoj estis traktataj pli malpli kiel plenrajtaj civitanoj, la cionismo (la judnacia movado) ne estis tre populara, k la plimulto el la tieaj Judoj konsideris sin. ano de la ŝtato, en kiu ili naskiĝis k gajnis sian porvivaĵon. Ĉe ili ne ekzistis juda naciismo, kvankam ankau ĉe ili ne mankis la emo teni la rason kiom eble plej pura.

La krimigoj kontraŭ la Judoj fare de la Hitlera reĝimo konsekvence plifortigis ĉe la nun ankoraŭ vivantaj Judoj la naciismon. Mi tion komprenas, ĉar tiu procezo estas tute homa, precipe ĉe la Judoj, kies rasismo post ĉiu pogromo akiras kvaŭzaŭ novan forton. Sed tio ne signifas, ke mi ĝojas pro tiu fenomeno, nek ke mi kredas, ke tiu refreŝigita naciismo kondukos al pli da feliĉo por la juda popolo k ke ĝi (Palestino) solvos la problemon. Male, mi opinias, ke tiu dinamika rasismo persekutis la Judojn tra la jarcentoj kiel plej terura fatalo, pro kiu la solviĝo, la kunfandiĝo de ili kun aliaj rasoj ne povis okazi. Ni komprenas la emon al Palestino, k ni esperas, ke ĉiu Judo kiu deziras iri tien trovos tie sian feliĉon, sed ni forte dubas, ĉu Palestino solvos la judan problemon.

Ĉiu naciismo per si mem kreas problemojn k ĉiu nova naciismo kreas novajn problemojn, ĥovajn militojn k estas esence reaktia. La samon ni povas diri pri la koloniaj popoloj, kiuj nun iom post iom ricevas sian nacian suverenecon, al kiu ili — sed ĉefe tiuj, kiuj mem deziras ekspluati la amason — daŭre sopiris. La legantoj ne kredu, ke mi intencas defendi la rabemon de la imperialismaj subpremantoj, sed mi estas konvinkita, ke estus multe pli racie k multe pli feliĉige por la popoloj, se tiu kolonia „unuco“ estus anstataŭata per justa, konscia k libervola unueco, kiu donus pli lumajn perspektivojn ol la kreado de novaj nacioj, kiuj jam nun penadas ekstermi unu la alian. Ke tiu

S.A.T. ekskomunikata!

El letero de polia K-do ni citas jenon: „.....En sia kongreso, kiu okazis en Varsovio, la 5 de oktobro 1947, la Pola Esperanto-Asocio decidis ke siaj anoj ne povas aparteni al SAT, nek al IEL ĉar tiuj ĉi asocioj enlasas germanojn.....; SAT havas malbonan strukturon; al laborista Asocio devus aparteni homoj laborantaj, socialistoj ĉiutendencaj aŭ apartenantaj al neniun partio (sindikatoj), sed estas ridinde ke en SAT troviĝas grupoj kiel poŝtmark-kolektantoj, nudistoj..... SAT havas sian ideologion sennaciecan; tio estas utopio; neniun nacion ni forbalaos el la planedo.....; SAT devas forjeti utopiaĵojn de LANTI

Sen komento.....

libervola unuiĝo inter oriento k okcidento ne realiĝis k probable ne baldaŭ realiĝos, pri tio certagrade kulpas la socialisma movado, kiu daŭre stimulis la naciismon de la indiĝenoj anstataŭ maturigi ilin por la internacia socialismo.

Rigardante la plimultiĝon de tiuj aŭtonomaj ŝtatoj, ni povas senriske antaŭdiri, ke kreskos la konfliktoj inter la popoloj, konfliktoj, kiuj baras la vojon al prospero k paco por ĉiu. Tial mi bedaŭras, ke la Judoj (almenaŭ granda parto el ili) serĉas savon en la apartiĝo, k ke ili ne komprenas ke nur tio, kio unuigas nin, ĉesigos la krimajn ekscenojn de la rasmalamo. Fine nur la supernacia socialismo povos savi nin el la nunaj rasaj k naciaj problemoj k homoj raciaj fidas k agadas por tiu socialismo. Ili jam nun aplikadas en sia vivo ĉion, kio unuigas la homaron; ili pretas rezigni sian naciecon aŭ rason, ili deziras solviĝi en la grandan tutmondan familion, ĉar ili konscias, ke la feliĉo de la homaro venos nur post ekstermado de ĉiuj arkaj doktrinoj, kiuj metas homon kontraŭ homo favore al tiuj, kiuj per tiuj doktrinoj k per la homa di ideco nutras sin.

Mi ne envas Palestinon al la Judoj, sed ĝi estas la vojo returne, la vojo al la mal-luma estinteco kun ĝiaj sangaj ekscenoj. SAT-ano n-o 17668.

PLENA VORTARO ESTU VIA GVIDILO!

La Tombejo de Valdheim (Waldheim)

En la jusa novembro pasis ĝuste sesdek jaroj, de kiam martiriĝis Ĉikagaj laboristoj por la afero de l'Socialismo. Decas do, ke ni memorigu pri tiuj faktoj en „S-ulo”. Ili kuraĝigu nin en la propra malfacila luktado.

RED.

Pace ripozas niaj bravaj sentimaj kamaradoj en la idilia tombejo de Valdheim. 60 jarojn kuŝas tie niaj k-doĵ Georg Engel, Adolf Fiŝer, Ludov. Lingg, Albert R. Parsons, Aŭgusto Ŝpies, kiuj batalis por Libero k Justo, por la — ANARKIO —.

La plej terura k abomena juĝeja murdo okazis siatempe en la muroj de Ĉikago; la 11-an de novembro 1887; en la lando plej demokrata, en la lando de l'liberuloj k bravuloj.

Jen la okazintaĵoj antaŭ la 11-a de novembro 1887: Socia problemo kvazaŭ ne ekzistis en la lando de senlimaj ebloj ĝis komence de la 70-aj jaroj — en Usono —. Sed la grandkapitalismo rapide evoluis, k tute nova situacio ekestis. La novaj parvenuoj senindulge ekspluatadis la laboristaron. Kaj la unuan fojon oni povis konstati senlaborecon en la plej granda kontinento de la mondo.

En 1873 oni nombris sole en la ŝtato Nov-Jorko 200.000 senlaborulojn. En preskaŭ ĉiuj pli grandaj urboj okazis manifestacioj de senlaboruloj.

Grandegaj krizoj ekstremigis la Novan Mondon; k unu striko sekvis la alian en printempo de 1885 — majo 1886. Inter la laboristoj estiĝis la plej terura mizero. Imagu, ke tiutempe la ĉiutaga laboraŭro ofte atingis 10—14 horojn, eĉ 16.

La laboristoj estis bone organizitaj en diversaj organizoj kiel „Knights of Labor” 500.000 anoj, Unuiĝo de Metiistoj k Laboristoj, ĉi tiu lasta estis plej forta en Ĉikago, — Krome „Centra Laborista Unio” — sub influo de anarkistoj. La sindikatoj, ĝuste taksante la ekonomian k politikan situacion, decidis malpliigi la laboraŭron je „okhora labortago”.

En oktobro 1884 la Kongreso de Federitaj Sindikatoj k Laboristaj Unuiĝoj de Usono k Kanado decidis: ekde Unua de majo ekbatali por la okhora labortago, se necese per ĝenerala striko. Sekve fondiĝis la tielnomata „Okhora Ligo”. La plej vigla por okhora propagando okazis en Ĉikago. Je la unua de majo 1886, 350.000 laboristoj strikis. 150.000 tuj batalakiris la okhoran labortagon. En Ĉikago mem strikis 50.000 Laboristoj. Antaŭ la fabriko de Mc Cormik, en kiu plue laboris strikrompantoj, okazis kunpuŝiĝo inter strikantoj k Pinkertons.¹⁾ La laboristoj venkis super la Pinkertons. Sed poste aperis policistoj k siaflanke ekatakis la laboristojn. El tiuj lastaj multaj estis vundataj k ses pafmortigataj. Ŝpies, atestanto de tiu ĉi sceno, verkis la famkonatan Venĝo-Ĉirkuleton: „Se vi estas viroj, se vi estas filoj de viaj antaŭuloj, kiuj verŝis sian sangon por liberigi vin, tiam vi ribelos kun la forto de Herkulo k detruos la sangavidan monstron,

minacanta pereigi vin. Al la armiloj! Ni vokas vin al la armiloj!” Sole kelkaj centoj el tiu ĉi cirkulero estis disvastigataj, ĉar la okazintaĵoj rapide sinsekvis.

La postan tagon okazis sur la Haymarket protest-kunveno; parolis tie Ŝpies, Parsons k Fielden. 170 policistoj alrapidis k atakis la kunvenintojn. En tiu momento iu ĵetis bombon: 50 laboristoj estis vunditaj k 4 mortigitaj; el la policistoj estis 60 vunditaj k 7 mortigitaj.

En la venontaj tagoj la gazetoj de la entreprenistoj-kapitalistoj k burĝaro freneze atakis la anarkistojn, precipe la sindonemajn al la laborista afero gvidantojn. La 20-an de aŭgusto la juĝistoj kondamnis niajn k-doĵn al mortpuno, sole Samule Fielden k Michael Ŝvab estis amnestiataj je dumviva pundomo.

La dekunua de novembro 1887 estas la plej terura k plej nigra tago en la historio de la laborista movado; kial? ĉar la laboristaro de Ĉikago, de Usono, k la laboristaro en la aliaj kontinentoj, precipe en Eŭropo, ne malhelpis tiun abomenan juĝist-murdon.

Jen tion niaj kuraĝaj k-doĵ laste eldiris: „La tempo venos, kiam nia silentado en la tombo estos pli potenca ol la voĉoj, kiujn vi nun sufokas!”. Tiel diris Ŝpies. Fiŝer elvokis: „Tio estas la plej feliĉa momento de mia vivo!”. Engels: „Vivu la Anarkio!” Kaj Parsons: „Ĉu vi permesas al mi paroli? Ho! viroj k virinoj de l'kara Usono!” Rimarkinte, ke la ŝerifo faris signon, li diris ankoraŭfoje: „Ŝerifo Matson, igu aŭdata la voĉon de l'popolo!” Li ne plu povis daŭrigi. Dum tio okazis la teruraĵo. Ili estis por ĉiam mortintaj, murditaj! Murditaj en la nomo de l'ŝtato, kiu ĉiam batalas kontraŭ la popolo k protektas sole la plej potencajn, — bonhavan klason.

Nia plej grava k sankta tasko estas: daŭrigi la verkon de niaj k-doĵ, kiuj ripozas en la tombejo de Valdheim. Same senlace, senhalte k energie batali por libereco socio — La ANARKIO!

Fr. Br.

¹⁾ Pinkertons: tielnomata figardistaro nomita laŭ la du fratoj Pinkerton, kiuj ŝirmas la havaĵojn de kapitalistoj; precipe ili agadis dum strikoj, protektante strikrompantojn.

Ĉu Esperanto estas facila?

La artikolo de K-do M. de Waard provokis interesan diskuton pri la utilo de la akuzativo. Li mem nur konsilis, ne tro ofte apliki tiun kazon en dubaj okazoj kaj ĝenerale eviti nenecesajn malfacilaĵojn. Li asertis, ke la Esperantistoj mem senbezone malfaciligas la lingvon. Li restis tute inter la limoj de la Fundamento.

Sed K-do P. Moth transiris tiujn limojn. Li propagandis sisteman forlasadon de la akuzativa formo kaj tiel suriris la

danĝeran vojon de reformoj. Ĉar kial nur forigi tiun ĝenan finaĵon? Ĝi ne estas la sola kaj eĉ ne la plej granda malfacilaĵo en Esperanto. Ni povus „simpligi” nian lingvon ankaŭ alirilite.

Ekzemple: kial ni bezonas la pluralan formon de la adjektivo? „La urboj estas granda” kaj „La granda urboj” estas tute klaraj. Ankaŭ diferencaj finaĵoj por adjektivoj kaj adverboj ne necesas, ni povus diri: „La sinjorino kantas bela”.

Aparte malfacila estas la problemo de la transitivaj kaj netransitivaj verboj. Kial ne: „Ni rompas la glason” kaj „La glaso rompas?” analoge al la kutimo en diversaj naciaj lingvoj?

Sed, iu kontraŭdiros, kiel ni esprimu la diferencon inter „Ni manĝas la ĉevalon” kaj „Ni manĝigas la ĉevalon”? Nu, tute simple, la dua frazo tekstu: „Ni lasas la ĉevalon manĝi” aŭ: „Ni igas la ĉevalon manĝi”. Eĉ la formon „Ni manĝigas la ĉevalon” ni povus konservi, sed nur por okazoj de vera bezono. La ordinaraĵoj igi-igi-formoj fariĝus superfluaĵoj.¹⁾ La lernantoj ne bezonus rompi sian kapon pri ili.

Mi donis nur kelkajn ekzemplojn de simplaj reformoj, kiuj laŭ mia opinio faciligus la lernadon de Esperanto. Ilia apliko ne multe ŝanĝus la lingvon. Ili rilatas nur al simpligo de la gramatiko.

Generale mi opinias, ke la gramatiko ludas tro gravan rolon en Esperanto. Dum la praktika uzado ni ĉiam devas esti konsciaj pri gramatikaj kategorioj: ĉu temas pri adjektivo aŭ adverbo, pri transitiva aŭ netransitiva verbo, pri nominativo aŭ akuzativo, ktp. Precipe por komencanto tio estas malfacila, sed ankaŭ tre spertaj Esperantistoj faras erarojn pro tiu kaŭzo, ĉe la parola uzo eĉ multe da eraroj.

Nia mirinde bela gramatika sistemo estas tre interesa por lingvistoj, ĉu profesiaj, ĉu amatoraj. Por la ordinara Esperantisto, kiu nur ŝatas praktike rilati kun la mondo, ĝi estas iom ĝena. Kelkaj naciaj lingvoj estas tiurilate pli simplaj. Generale dirite: ju malpli da gramatiko, des pli bone!

Ĉu ni do proponu reformojn de nia gramatiko? La historio instruas nin, ke tio estus tre malsaĝa. Jam en la jaroj 1890—1894, kiam Esperanto estis infane juna, venis multaj reformproponoj. La tiamaĵ Esperantistoj malakceptis ilin. En 1905, en la Bulonja kongreso, oni deklaris la „Fundamenton de Esperanto” deviga por ĉiu Esperantisto kaj netuŝebla.

Ni ĉiuj scias, ke tiu decido estis saĝa, ĝi savis la lingvon de pereco. Kontraŭe la spertoj kun Ido montris, kiel danĝera estas la vojo de reformoj en lingvo, jam praktike uzata de multaj homoj.

Zamenhof avertis nin kontraŭ tiu danĝero en sia Antaŭparolo ĉe la Fundamento de Esperanto. Ni obeu tiun averton.

C. J. COPPENS.

¹⁾ Almenaŭ por originalaj verboj. La formoj blankigi, blankiĝi, soldatiĝi ktp restus. Sed, ili ne estas malfacilaj. Malfacile estas, scii pri ĉiu verbo, ĉu ĝi estas transitiva aŭ ne.

La interna ideo - Ĉu iluzio?

En la lasta tempo la Esperantistaj gazetoj donis multe da spaco al la temo, ĉu aŭ ne akcepti en la organizitan movadon germanajn Esperantistojn. Eĉ en Sennaciulo ni legis aludojn pri tiu sama afero, kaj kiel en la neŭtrala movado sin montris du partioj — unu por kunlaboro sub iuj kondiĉoj, kaj dua kontraŭ kia ajn kunlaboro.

En la ĵusa kongreso en Bern la polaj Esperantistoj (inkluzive de S-ino Wanda Zamenhof) kaj Palestinanoj, kune kun iuj balkanlandaj samideanoj minacis fari demonstracion kaj forlasi la kongreson, se germano salutparolos. Fronte al tiu samideaneco (!) la germano rezignis por konservi la „harmonion”. Oni rimarku, ke tio okazis en la tendaro mem de la neŭtrala movado, kiu antaŭ ĉio predikas la „internan ideon” de Zamenhof kaj la principon de homaranismo kiel esencajn faktorojn en la Esperantismo.

Povas esti, ke iuj personoj volos defendi la sintenon de la homoj, kiuj plej suferis de la infera reĝimo, kiun oni identigas kun la germanoj. Sed kion diri pri la antipatioj, kiuj ekzistas en tute aliaj rondoj? La Ĉeĥoj kaj Slovakaj Esperantistoj staras vizaĝ-alvizaĝe kvazaŭ rabiaj hundoj: la anoj de la Reĝa Belga Ligo parolas kun naŭzo pri la anoj de la Flandra Ligo; iuj Irlandaj Esperantistoj riproĉas Anglajn pro politikaj okazaĵoj ekster la dispono de ambaŭ; kaj en plufaj landoj ni trovas tiun mirigan sintenon ĉe la predikantoj de „interna ideo”.

La demando nepre sin trudas, ĉu fakte tiu „interna ideo” ankoraŭ validas, aŭ ĉu ĝi fariĝis nur unu plia naŭza sentimentalaĵo de homoj tiom sataj de tiaj emociaj fiktivaĵoj, ke ili dronas en la maro de malracio, kaj jam ne kapablas pensi objektivite?

Estu kiel ajn, la faktoj devus servi al veraj mondcivitanoj kiel admono, ne lasi sin gvidi kaj delogi de falsaj motivoj. Al tiuj suferintoj pro la nazi-reĝimo ni memorigu pri la alia reĝimo, ankoraŭ aktuala, ĉiam alesta, ĉiam preta elekspluati tiajn efemerajn fantaziaĵojn de principe nefirmaj cerboj — la kapitalista reĝimo. Antaŭ ĉio, la laboristoj ne permesu, ke tiaj emociaj malobjektivaĵoj dividu ilin.

La interna ideo de socialismo kunigu nin en fortan unuecan anaron. Tiu nia interna ideo, fontinta en komunaj sufero, eksploateco kaj mizero spirite kunligas min pli firme kaj pli solide ol kia ajn abstrakta ideo, kiu dissolviĝas antaŭ la nura mencio de supozata alipartieco. La interna ideo de la socialismo estu por ni la forta malvarma vento de la racio, kiu forblovas la emociajn nebulojn, kiuj malorientas nin kaj nin perdigas.

La objektiva SAT-ano povu rekoni la veran „internan ideon” de solidareco klasa, vere homarana.

K-do MAK.

„SENNACIULO” estu konforma al sia tasko!

La SAT-eldonoj, ankaŭ la periodaĵoj, devas servi esence al klerigaj, kulturaj taskoj. Ili devas celi nobligi la sentojn de la legantoj, se temas pri beletristiko, — instrui ilin, se temas pri sociaj aŭ historiaj pritraktoj.

En „S-ulo” abundas lastatempe la teoriaj k biografii-historiaj artikoloj. Mi ne volas diri, ke mi persone malkontentas pri tia legaĵo. Oni akiras per la alproprigado de tiaj verkaĵoj klarecon pri interrilatoj, tempkondiĉaj okazoj, homa luktado en difinita epoko. Certe estas interese ekscii pri la vivcirkonstancoj de K. Marks, en kiuj li verkadis sian ĉefverkon, aŭ pri la rolo de Lenin dum j. 1919—24. Ankaŭ estas instrue legi pri Belami-a soci-idealo k Distribua sistemo de Abundo; same pri elkonstruado de fervojoj en centra Azio, sub iniciato de Stalin, helpe de „volontuloj”. (Cetere, ĝis kia grado tiaj laboristoj povas esti nomataj volontuloj, tion meditu la legantoj: sub „volontulo” oni komprenas personon, kiu faras ion sendevige, nur obeante sian propran emon.)

Tamen mankas en la konsisto de „S-ulo” ĉiam ankoraŭ tro multe el tio, kio esence servas al la k-do: *komparado de faktoj*, ekz. de vivkondiĉoj nuntempaj en diversaj regionoj de l’terglobo, k speciale la efikoj de aplikado de socialistaj teorioj sur la vivnivelon de l’homoj.

Ni scias, ke en la hodiaŭa stato tiu aplikado de teorioj altcelaj restas ĉiam nur duone efektivebla ago, ĉar la kapitalismo tenas firme la ŝlosilojn en manoj, eĉ tie kie laŭ ekstera aspekto pli potence influanta laboristaro regas super ekonomia k politika formado de regno, kie socialistaj eksperimentoj okazas en nacia kadro.

Pro militaj k militsekvaj necesoj regas ekz. en multaj landoj la porcia karto, la t.n. „raciigado” de la disponebla malsufiĉa nutraĵaro. Ĉi tiu porciigo, normigita laŭ la skalo egaleca, povus esti konsiderata kiel procedo de socialista just-ordigo,..... se ĝi ne estus senĝene rompata de la posedanta klaso, kiu ĉiam scias havigi al si bezonaĵojn k luksaĵojn ekster la porcia karto (kvankam por pli altaj prezoj). La liberalisma merkato (liber-ekonomio) trovas tiel ankaŭ plue sian profiton, eĉ en landoj, kie ŝajne regas rigore la plan-ekonomio. La kapitalistaj ludreguloj ĉie ankoraŭ trovas aplikon, k korupteblaj per oro estas ĉiuj ekonomie malfortaj k sekve suferantaj hom-kolektivoj. Ni scias, ke ankaŭ en Sovetio la hierarkio de l’ekonomia potenco estas tre multstupa, k la diferencoj en la aĉetpovo de l’unuopa homo (eĉ laboristo) tre konsiderindaj.

Komprenable nuraj statistikoj pri tiu aŭ alia ekonomi-politiko aŭ pri nutrajvaloroj aŭ industriproduktaj valoroj ankoraŭ ne povas absorbi plene la atenton de laborista leganto. Ĉi tiu volas trovi en legaĵo tie k tie ankaŭ personan noton, sperton de l’raportanto, ion ei la persona vivo, tie! kiel oni trovas en leteroj inter kamaradoj.

Ĉiukaze la verkaĵoj devas havi ian pozitivan flankon, kiu povas utili al ni, kiu povas servi por montri rimedojn, metodojn,

vojon, sen iĝi teoria predikado. Ekz. rilate nian sennaciecan batalon, mi memoras esti leginta, aŭdinta riproĉojn en tiu senco, ke ni estas tro negativaj en nia kontraŭpuŝado, k ke ni je la loko de l’detruotaĵo k detruendaĵo ne scias meti ion pozitivan, realan, kio estus pli ol ideala teorio.

Sed al tio ni povas facile respondi, ke unua tasko estas forbalai la rubaĵon, ĉion kiu ĝenas celkonforman evoluon. K dua tasko nur estas plenigi la estiĝantan malplenan. Cetere tiu procezo okazas samtempe: Alterne kun la malkonstrua laboro ni jam vidas leviĝi la fundamentajn kolonojn, kiuj estas portontaj la novan konstruon. Io tia elstare pozitiva estas niaj kongresoj, estas sennaciecaj renkontiĝoj, ankaŭ junulartendaroj (kiel projektita unu en bavaraj Alpoj kun klardirekte sennacieca karaktero por somero 1948).

Oni povas iafoje ankaŭ rimarki tiajn pozitivajn demonstrojn en kultura aŭ laborista vivo. Se inteligentaj laboristoj hodiaŭ fratece per esp-o interkorespondas, ignorante la landlimojn, se ili estas pretaj interŝanĝe gastigi siajn idojn, por ebligi al ili edukadon iel jam sennaciecan, tiam tio estas pozitiva signo sur la vojo, laŭ kiu ni intencas irigi pli maturan k kompreman homaron.

Ankaŭ la artoj havas en si la eblon kreskigi senton pri sennacieco k komuna homarkulturo. Artistoj publike sin prezentantaj povas esti misiistoj de nova supernacia kulturo. Nur antaŭ kelkaj tagoj mi havis travivaĵon, kiu estas vicigebla en tiu kategorio: Franca bonege ludanta pianistino prezentis sin al ĉefparte germana publiko en la brita okupzono germania. La nobla arto kontaktigis, entuziasmigis la homojn, muziko ja estas universale komprenebla esprimilo!) k vekis komunsentojn, kiuj forviŝis komplete ĉion rilatan al diversnacieco.

Same kiel tiu pianistino, ankaŭ aliaj artistoj, ekz. famaj verkistoj, estas bone lokitaj por ludi jam nun la rolon de unuecigantoj, sennaciigantoj. Dependas nur de la bona volo, de ioma kvanto de sincero k kuraĝo. Sed ĝis nun pli multaj homoj el tiuj elituloj havas la inklinon k la „kuraĝon” sin liveri al la servo de iu politika partio aŭ skolo, kies hierarkio neniel rompas kun la tradicioj koncerne kapitalismon, burĝismon, naciismon, militismon ktp. — ol ke ili, rekonante sian veran mision, dediĉus siajn fortojn tute al la ideo pri reala k pordaŭra Paco, kiu povas baziĝi nur sur rezigno je la nunaj kapitalistaj metodoj k procedoj.

Kiu ekkonis la tutan fatalan rolon, kiun ludis k ankoraŭ ludas la naciisma ideologio, tiu decidus esti plena sennaciemulo k konsideros kiel sian unuan taskon regi esperanton tiele, ke ĝi fariĝos al li pli kara ol la nacia lingvo, kies sonojn li ensuĉis kun la patrina lakto. K tiam li ekkonos, ke la grandaj malhelpaj fortoj en la hodiaŭa haosa mondo apogas sin sur burĝecaj tradicioj k nacieca kulto, por konservi sian monopolan superregadon.

N. BARTELMES.

DE LA 20-A KONGRESO DE S.A.T.

Argentino. Kdo José Maria DURAN, Casilla Correa 1802, Buenos Aides 8 pes.
Aŭstralio. Kdo Harry W. BUSWELL, 80 Alfred Street, Parkside, Sph. 10 ŝil.
Aŭstrio. Kdo Ludwig SAGER, Maderspergerstr. 14, Wién-XVI 7 ŝil.
Belgio. Kdo G. BASTEELS, 190 rue de Monténégro, Forest-Bruxelles (poŝta konto No. 252523) 80 f.b.
Brazilio. Kdo Roberto das NEVES, ĉe Esp. Klubo, str., Araujo Porte Alegre 36, Rio de Janeiro 40 krz.
Britio. Kdo O. MELTON, 19 Brentwood Grove, Great Barv., Birmingham-22-a 7½ ŝil.
Bulgario. Kdo Pantelej Stojanov ĜUMAKOV, str. Morava, 89, Sofio 300 lev.
Ĉekoslovakio. Kdo Josefo PATERA, Dvorakova 24, Pilzen 45 kĉs.
Danio. Kdo R. JORGENSEN, J. P. Jacobsenvej 59, Aabyhoj (postgirokontoret No. 59062) 8 kr.
Finnlando. Kdo Esko MANTYNEN, Kymentie 60 as. 19, Helsinki. P. (ĝiro 9539) 200 fmk.
Francio S.A.T. 67 av. Gambetta, Paris 20; poŝta konto No. 1234-22 Paris) 200 f.f.
Germanio: — por tuta Germ.: Kdo Leonhard PUFF, Am Ebelfeld 237, Frankfurt a/M. Praunheim (16) 5 Rmk.
 — aparte por la brita zono: Kdo E. SCHMIDT, Hirtenstr. 6, Dortmund (21-a) 5 Rmk.
 — aparte por la usona zono: Kdo Erich TIETSCH, Schwabstr. 22, Stuttgart-W. 5 Rmk.
 — aparte por la franca zono: Kdo Julius MATHES, Sternwaldstr. 5, Freiburg i/B 17-a 5 Rmk.
 — aparte por la soveta zono: Kdo Paul KÖCKERITZ, Klopstockstr. 56.III, Dresden A. 29 5 Rmk.
Hungario. Kdo J. MODRA, Sagvari Endze. V. 25 f 1. Pestszenterszebet (poŝta konto No. 32.221) 10 for.
Italio. Kdo Mario GUZZI, Via Modena a 33, Torino 500 lir.
Jugoslavio. Kdo Premuj VJEKOSLAV, M. Stanivukoviĉa 1, Osijek II 70 din.
Meksikio. Kdo Jozéfo SERANO, Central de Talabareros 72, Col. E. Carranza, Meksiko D.F. 5 m.p.
Nederlando. Kdo C. v. ESSEN, Floretstr. 10, Rotterdam-Z., poŝtkonto 86033) 3 gld.
Norvegio. Kdo Jorgen ROSENDAHL, Uelandsgata 63, Oslo 38 7 kr.
Oceanio. Kdo Aart de BES, Verzorgings Peloton 552086, T. Brigade F.M.S.S., Semarang, Java 3 gld.
Polio. Kdo Albin PIOTROWSKI, ul Grottgera l. m. 14, Krakow ... 200 zl.
Portugaliao. Kdo João Frazao de FARIA, Rua José Estevao No. 26, 3° E., Lisboa 36 esk.
Sud-Afriko. Kdo David DAMBE, P.O. Box 2418, Johannesburg 7½ ŝ.
Svedio. Kdo Justo BOBERG, Palmfeltsvägen 49, Enskede (poŝta konto No. 3815) 6 kr.

	Enspezoj	Elspezoj
Kotizoj	8684,78 dkr	
Subvencio	1399,77	
Glumarkoj	454,32	
Festoj	146,00	
Loĝado	821,00	
Festoj k vi itoj		4173,05 dkr.
Emblemoj		807,00
Afranko		419,47
Propagandiloj		321,83
Kongresoj kaj kunvenejoj		886,75
Glumarkoj		470,00
Labormaterialo		311,14
Loĝado		1119,55
Kongresmaterialo		1231,00
Diversaĵoj		637,35
Gajno		1128,73 ..
	11505,87 dkr	11505,87 dkr

La gajnon 1128,73 dkr la SAT-mondo decidis dividi en tri partoj po 376,24 dkr por SAT, la Amsterdama kongreso kaj la SAT-rondo.

O. K. K.

La subvencioj estas jenaj:

Gajno de la 19-a kongreso	229,27 dkr
La komunorganizo de la sindikatoj (La kongresejo)	750,00
Aarhusa sindikato de domĉarpentistoj	50,—
fabriklaboristoj	50,00
ter- kaj betonlaboristoj	25,00
librobindistoj	50,00
lignajistoj	50,00
laktindustrilaboristoj	20,00
ŝoforoj	25,00
masonisthelpantoj	25,00
maŝinlaboristoj	100,00
K-do C. B. Lundborg, Malmø	5,50
K-do A. C. Deacon, Canterbury	10,00
K-do Johs. Johansson, Stokholmo	10,00 ..
	1399,77 dkr

Statistiko pri partopreno.

	aliĝis	efektive ĉeesti
Anglio	40	30
Argentino	2	0
Aŭstrio	1	1
Belgio	6	5
Ĉeĥoslovaki	1	0
Danio	143	141
Francio	197	168
Germanio	14	0
Nederlando	248	231
Norvegio	13	13
Polio	4	0
Svedio	78	71
Usono	3	2
	750	662

★

KONGRESA LIBRO.

Ni havas ankoraŭ kelkajn kongresajn librojn, kiujn interesitoj povas aĉeti per alsendo de 2 int. respondkuponoj al k-do Magnus Jacobsen, Brendstrupvej 8, Aarhus.

La libro aspektas bela kaj ĝi enhavas artikolojn pri Lanti (de N. Bartelmes), pri la urbo kaj pri la diversaj entreprenoj, kiujn ni vizitis, kaj krome kompreneble la tutan ofi ialan programon de la kongreso.

O. K. K.

Svisio. Kdo Auguste BAVAUD, Charmille 30, Genève 7fr. sv.
Usono. Kdo Arthur S. KANE, 1121 N. Central Ave. Apt. 12 D. Glendale 2., Calif. 2.50 dol.

La necititaj landoj pagu la kotizon por Nederlando aŭ Francio.

Ne atendu pli por pagi vian kotizon 1948! Tiel vi helpos finance al la Asocio k faciligos la admi istradon.

HOMOJ EN MILITO de Andreas Latsko. Tradukis Karlo Minor. La libro konsistas el diversaj apartaj rekontoj el la milito. Latsko estas granda artisto k Minor sperta espisto. Havebla bindita (2.90 gld. 135 fr.) aŭ broŝurita (2.50 gld. 115 fr.) Ĉiuj prezoj plus afranko. Mendu ankoraŭ hodiaŭ ĉe SAT en Parizo aŭ R-damo aŭ ĉe via landa peranto.

VENKU, KARA LINGVO!

Kiam trankvilo regas en mia koro,
Malofta hazardo estas tia horo.
La pensoj ordiĝas, animo sentas libera sin,
Al malproksimo, al pacaj regionoj io
[logas min.]

Rifuĝi de fenda haoso kaj nuna pensa
[sinteno,
Torturitan animon stimuli per sana
[kompreno,
Kadukan korpon ripozigi en sunradio,
Mi revas pri tio kaj dezirus plu nenion.]

Vivi en harmoni' kaj daŭra pacostato,
De nenia malbonaĵo atakate.
Ĉu ekzistas io simila sur la tero?
Ne, mi asertas, mond' ŝajnas kvazaŭ
[infero.]

La mond', per kruela milit'disbatita,
Homaro per akra malam' disŝirita.
Ho kiu, mi demandas, do estas kulpulo?
Detruis feliĉon kaj amon per brulo?

La homoj en ĉiuj partoj de l' tero
Ne sekvu nacian standardon al buĉad'
[kaj mizero.
Kial vi, amaso, ne kontraŭstaras potencan
[ondon?
Kial vi konstruas kaj detruas belegan
[mondon?]

Ne lasu vin trompi, ke post milito estos
[vi la sinjoro!
Ne kredu pri rekompenco per liberiĝo
[kaj orol
Sklavoj vi estos, kriplaj, maltaŭgaj estaĵoj
Prirabitaj de spirit' kaj konscihavaĵoj.]

Vekiĝu do, gefratoj, el prema letargio,
Forskuu marasmon, liberiĝu de agonio.
Postsekvu amase la verdan standardon,
Sub ĝi vi bezonas nek pafilon nek
[ponardon.]

Unuigas, fratigas la verda standardo
Ne distingas pri deveno, religio, pri raso
[nek klaso.
Kvinpinta verda stelo, simbolo de
[paĉkonstanto,
Vivu kaj venku! kara lingvo esperanto.]

GRENJO PROKOP.

JUNUL-FAKO

Sekve de nia lasta komuniko ni publikigas la sugestojn senditajn de la Esperantista Junularo en Germanio k ni petas ĉiujn ge k-ojn pridebati ĝin, aldoni sian propran kritikon k planon k konigi ilin al ni. Ekde nun ni devas prepari la bazojn de la estontaj diskutoj dum la venontjara SAT-Kongreso!

— 1°) La fako estu nepre nur Fakorganizo de SAT.; tio signifas ke nur junaj SATanoj povas aliĝi aŭ ke Junular-fakanoj devas aliĝi al SAT.

— 2°) por ĝi valoras la statutaro de SAT.

Internacia Altlernejo persistas!

Tasko ankaŭ por la esperantistoj

Post milito k okupado la internacia altlernejo en Elsinoro (Helsingør, Danio) denove plene funkcias laŭ sia destino. Pasintjare la idealisma lernejo povis festi sian 25-jaran ekziston. Dum tiu periodo pli ol 10.000 gelernantoj el 36 landoj vizitis la lernejon. Preskaŭ duono estis danoj, poste sekvas skandinavoj, angloj, germanoj k usonanoj kiel la plej multnombraj. En pluraj landoj funkcias organizoj de malnovaj lernantoj, kio pruvas la tre intiman kontakton k kamaradecon inter lernintoj de IHS (kutima mallongigo de la lernejo).

Ekslernantoj posedas ĉe la eksterordinare bela parko de la altlernejo propran ferian domon, kie ili povas libere pasigi libertempon. Favore por ekslernantoj ankaŭ estas, ke IHS ĉiujare interŝanĝas kelkajn lernantojn kun altlernejoj en Britio, Usono k Nederlando.

La celo de la altlernejo estas baze de la ideoj de Grundtvig kreskigi la homan solidarecon inter diversaj nacioj. Ĝia metodo estas persona, ĝia pedagogio laŭ individuaj principoj atingi, ke lernantoj ankaŭ estu instruistoj k inverse. La vivo en la altlernejo per si mem atestas, ke reciproka toleremo inter homoj k nacioj tute eblas k ĉiam estas fonto de riĉa evoluo pro individuoj k socioj. La lernejo volas prepari la spiritan internaciecon, kiu estas nepre antaŭkondiĉo por ekonomia k politika internacieco.

Por atingi tiujn ĉi celojn la lernejo akcelas kiom eble plej internaciigi la stacion de instruistoj k gelernantoj. Konstantaj instruistoj estas 3 danoj, unu svedo, unu anglo k unu germano. Krome funkcias intermite ankoraŭ pluraj eksterlandaj instruistoj.

Ordinare estas 75 skandinavoj k 50 eksterlandanoj dum la vintra semestro kiu komenciĝas 3-an de novembro k 7-an de januaro. Someraj semestroj komenciĝas

— 3°) ĝi eduku la junulojn laŭ la spirito de SAT ĝi subtenu SAT ĉiamaniere laŭ sia forto precipe varbante novajn membrojn, edukante novajn respondeculojn por SAT.

— 4°) ĝi eldonu propran gazeton, kompreneble modestan, kiu estos pagata de la leganto mem.

Jen la kvar punktoj, kiujn vi pripensu. Diru ankaŭ kion vi opinias pri komuna tendaro 3 aŭ 4-taga, post la Kongreso.

Skribu ĉiuj al: MIKETO, 12 Avenue Ledru Rollin, Paris-12 Francio.

Ni atentigas la legantojn, ke pri la artikoloj en nia organo respondecas nur la verkintoj k ne la asocio, escepte tion, kio estas subskribita de la P.K. de S.A.T.

21-an de aprilo k por special-kursoj sinsekve.

La lernantoj povas ĝis certa grado mem elekti temojn, kiujn ili deziras studi. La ĉefa instruado estas pri la fremdaj lingvoj, k pro la ĉiutagaj konversacioj kun eksterlandanoj oni rimarkinde facile lernas. Sed krome diverstemaj studrondoj k prelegoj pri internaciaj rilatoj okupas grandan parton de la tempo, k ĉio estas per grupdividiĝo akomodita laŭ la lingva nivelo de la lernantoj.

Esperanto bedaŭrinde ankoraŭ ne estas oficiale lingvo, kvankam ĝi ludas certan rolon. La oficejo korespondas esperante (adreso International Højskole, Helsingør, Danio), k vintre oni povas partopreni kurson de nia lingvo. Jam 13 jaroj krome la danaj esperantistoj disponas pri la lernejo dum kelkaj semajnoj k tie aranĝas grandstilajn feriajn kursojn, kies sola lingvo estas Esperanto. Kutime la kursoj okazas dum la lastaj du semajnoj de julio, k la adreso de tiuj ĉi kursoj estas L. Friis, Inge-mannsvej 9, Aabyhøj, Danio.

Mi plurfoje parolis kun la lerneja estro, Peter Menniche, pri enkonduko de Esperanto kiel oficiala instrua lingvo flanke de la t.n. ĉeflingvoj, sed ĝis nun la angla okupas suverene la ĉefan lokon. Tamen s-ro Manniche simpatias al nia lingvo k movado, kiu ja estas tiom parenca al la spirito de la altlernejo. Li deklaris, ke se multaj esperantistoj venos al la lernejo, ili kompreneble estos respektataj k grandparte povos aranĝi reciprokan instruadon. Jen do la vojo. *Multaj esperantistaj lernantoj en IHS signifas oficialigon ankaŭ de Esperanto.* Ni ne hezitu profiti tiun ĉi gravan eblecon.

En IHS oni ne penas vesti homojn en spiritaĵoj uniformoj. Se vi venas religia, vi estas respektata kiel tia; se vi venas revolucia, vi rajtas libere prezenti vian doktrinon. Ĉi tie oni dorlotas ĉion, kio estas komuna por homoj, *mirinde oni konstatas, ke finfine estas pli kio kunigas nin ol kio disigas nin.*

Ankaŭ ni eble povas ion lerni per la persistado de IHS-lernejo unika en la mondo.

POUL THORSEN.

NIA **POŬTO**

Al E-Asocieto Heilbronn. Mi sendis vian leteron per kiu vi petas helpon, al la P.K. en Parizo, ĉar nur ĝi kontaktas kun k-do Bonesper en Usono. B. W.

El Hungario. K-do P. Balkányi el Budapeŝto kore dankas en la nomoj de la Hungaraj K-doĵoj tiujn Germanajn k-doĵojn, kiuj sendis salutojn kaj korespondeziraĵojn al la Hungaraj k-doĵoj, kaj petas pardonon, ke ili ne povas respondi, ĉar ne ekzistas poŝtinterreto.

RECENZOJ

Theo Thijssen: La nevenkebla ĝeno. Tr. F. Faulhaber. Kontrolita de la Literatura Komitato. Kun desegnoj de B. Schuurmans. Formato 19 x 13 cm., 320 paĝoj. Libroservo F.L.E., Amsterdam. Havebla ĉe SAT (Rotterdam aŭ Paris) 5.20 gld. aŭ 235 ff. inkluz. la afrankon.

Speco de romano, prezentita kiel vivmemorajoj de la aŭtoro. Temas pri la serio da malagrablaĵoj, kiujn la malriĉo de liaj gepatroj alportis al la heroo, devigata dum longajn jarojn surhavi nur malbonsidajn, strangaformajn aŭ eluzitajn vestojn. Tiuj etaj mizeroj estas priskribitaj kun tre simpla tono kaj diskreta humuro, tiel ke oni ne povas ne simpatie rideti al la malkaŝeco kaj bonintencemo de la rakontanto. La sinsekvaj aventuroj estas vive pentritaj, per ĝustaj kaj sobraj peniktuŝoj, kaj eĉ ne mankas delikata emocio. Iom mirige estas nur, ke la verkinto ŝajnas tute malhavi socialajn konvinkojn kaj eĉ eviti tiun temon; mi ne povis, legante la libron, forpuŝi el mia penso la memoron de la broŝuro, en kiu G. B. Shaw rakontis pri „tiu mizero de la ŝuoj”, kaj sciis, el tiu ĉiutaga premiso, tiri utilan instruon pri la neceso de pli bone ordigita socio. De tiu vidpunkto, la verko de Th. Thijssen (pr. tajsno), rimarkinda laŭ la aliaj flankoj, aspektas iel kripla.

La traduko de libro tiel plena de realismaj scenoj kaj de triviale drastaj esprimoj estis malfacila: K-do Faulhaber sukcesis tiom, kiom estis eble en nia sinteza lingvo. Li skribas tre korekte (nur unu eraron pri akuzativo mi trovis, p. 134), kompreneble laŭ la Cseh-skolo (superflua uzo de „kiam” post „ĝis” kaj „dum”, ĝeneraligo de „tiom, kiom” en la grada senco, simpligo de „estus-inta” al „-is” post „kvazaŭ” kaj eĉ post „se” ktp.). Li eltrovis multe da sukaj dirmanieroj, kiuj meritas diskonatecon, kaj entute lasas sin legi kun plezuro. Tre malmulte da neologismoj, ne tre necesaj: „reversi (= returni veston), antimilitarismo (kontraŭmilitismo), konskripciuolo (rekruto), konstruicio (konstruo)”; aparte aprobinda estas la Kabe-a („(oponi” (kontraŭ-stari, -diri). Pri kelkaj aliaj punktoj, mi ne konsentas: „kordonoj” (vicoj, p. 45); „fluis laŭ la vangoj” (trafluis sur vangoj); „kaj nun evidentiĝas la tioman fojon, ke.....” (= unu fojon plie; p. 60); „bruluminta” (brulgusta, p. 67); „ĉapo” (kaskedo: ĉapo vizieron ne havas); „rondi la angulon” (rondiri, p. 108); „malarmigas” (malarmas, aŭ: senarmigas, p. 306); mi ne komprenis, kio povas esti „superĉemizo” (p. 116), nek jenan frazon: „Kiom preskaŭ mi tiam povis vidi la fadenon tra mia vivo” (p. 319; ĉu: „tiel proksima estis de mi la eblo vidi”?)

G. VARINGIEN.

Sub la verda Standardo

Esperanto-instruo al infanoj laŭ rekta metodo. Elementa kurso de P. de Korte. Esperanto-eldonejo J. Muusses, Purmerend, Nederlando.

Multaj kursgvidantoj preferas rekt-

Pacista Frakcio en S.A.T.

Raporto pri la Kunveno en la Aarhus-Kongreso.

La 4-an de Aŭgusto 1947; okazis en Aarhus Kunveno por finarango de Pacista Frakcio en S.A.T., kun 80 ĉeestantoj.

K-do Rofo estas elektita Prezidanto k K-do Reĝo, raportanto.

Rofo klarigas la celon de nia Pacista Frakcio en S.A.T., k proponas ke oni unue starigu mallongan regularon, devige prezentotan al S.A.T. por oficiala agnosko.

Komisiono estas tuj elektita tiucele, en kiu partoprenas K-dojoj Colo (Francio), Van Hauten (Ned.), Befeldt (Sved.), J. Sundhagen (Nov.), Thorsted (Dan.), k Macdonald (Skotland).

Membreco — La prezidanto proponas ke, por ebligi aliĝon de pacistaj L.E.A.-anoj ankoraŭ ne S.A.T.-anoj estiĝu 2 membrecoj: kiel „Aktivaj Membroj” ali-

metodan instruon. Ĉu ili pravas? Ni nun ne diskutu pri tio.

Sed, se oni aplikas la rektan metodon, oni preparu sin bone por ĉiu leciono kaj laboru sisteme, laŭprograme. Se ne, la fiasko estas certa.

P. de Korte faris seriozajn klopodojn en tiu direkto, fervore kaj lerte li kolektis la materialon. Lia metodo konsistas el tri partoj:

A. Tre detala *gvidilo* por instruantoj. Ne nur ĝenerale, sed por ĉiu leciono aparte la aŭtoro montras, kiel oni agu. Tiel la amatoro, kiu unuafoje instruas, trovas firman apogilon, sed ankaŭ la sperta kursgvidanto kaj la profesia instruisto profite pristudos ĝin kaj facile trovos la vojon.

B. Du *laboriloj* por la lernantoj. Ambaŭ konsistas el 20 lecionoj kun multaj desegnaĵoj. La libreto klarigas ĉiun ideon, ĉiun vorton per bildo, ne nur la substantivojn, ankaŭ agojn, ecojn, rilatojn, ktp. Krome la instruanto devas montri objektojn, aktori, demandi laŭ konsiloj de la gvidilo. Tiel oni malmulte bezonas uzi la nacian lingvon.

Nur la unua laborlibro aperis. La eldonisto promesis aperigon de la dua antaŭ la jarfino.

C. *Memorigilo*, t. e. kajero kun la vortprovizo. La vortoj staras en paroj aŭ en rilato kun aliaj. Malantaŭ la esperanta teksto estas spaco, kie la lernanto povas skribi la nacian tradukon.

La tuta metodo do havas 40 lecionojn, kiujn oni pritraktu en unu jaro, dum du horoj (aŭ kvar duonhoroj) ĉiusemajne. Ĝi enhavas gravan parton de la gramatiko.

Kritike traleginte la libretojn, ni opinias, ke la aŭtoro faris gravan laboron. Ni konsilas al gvidantoj de infankursoj, kiuj serĉas instrumaterialon, fari la provon.

La laborilo plaĉe aspektas. La lingvo ĝenerale estas pura. Unu kritikon ni faru: La vorto *ankaŭ* troviĝas sur neĝusta loko en la frazoj. Koncerne tion la nederlanda lingvo influis la aŭtoron. Tio estas precipe bedaŭrinda, ĉar la eraro troviĝas en multaj lecionoj.

C. J. COPPENS.

ĝos la S.A.T.-anoj kiel „Simpatiantaj Membroj” la ceteraj L.E.A.-anoj. La estraro, kompreneble, konsistos nur el „Aktivaj Membroj”.

Ĝenerala Gvidantaro — Estas unuanime elektitaj, kiel:

— Ĝenerala Sekretario k Tutmonda respondeculo, K-do J. C. Klijn, Wageenaarstr. 121 III, Amsterdam (O.), Nederlando.

— Help-sekretario, K-do Oudenhoven, (Amsterdam, Nederlando).

— Ĝenerala kasisto: K-do F. P. Jansen, (Zaandik, Nederlando).

— Kiel Zonperantoj estas elektitaj en: Nederlando, K-do B. J. Bishoff, Bestevaerstr. 125 H, Amsterdam (W.)

Danio, K-do V. E. Thorsted, Nij Munkegade 65, Aarhus.

Francio, K-do A. Sadier, 30 rue de la Chaussée, Montargis (Loiret).

Britio, K-do A. Macdonald, Temperance Hotel, Cupon Fife, Skotland.

Norvegio, K-do J. Sundhagen, Dele-nenggt. 29 IIII, Oslo.

Svedio, K-do A. Belfeldt, Box 5, Eksund.

Germanio, proponataj de Rofo: K-dojoj Bruno Siegert (Usona zono), Ernst Frank (Brita zono) k Julius Mathes (Franca zono) kies pacista movado akceptigis en la Sud-Baden-lando laŭleĝan rifuzon al milito k militservo.

La jarkotizo estas jene fiksita: 2 dan. kr. (aŭ egalvaloro) minimume; tamen, kunvivantaj gefamilianoj rajtas pagi kune nur unu kotizon.

Post korektado, unuanime akceptiĝas mallonga statuto redaktita de la komisiono. — Ĝi jene tekstas:

Regularo — La celoj de la Pacista Frakcio en S.A.T. estas:

1-e) — Studi, malkovri k disfamigi la kialojn de milito, esplori la rimedojn kontraŭajn k utiligi ilin por kiel eble plej faciligi la kontraŭmilitan taskon en la kadro de S.A.T.

2-e) — Meti esperanton je la servo de la pacistaj organizoj ne esperantistoj por tiel helpi ilin.

3-e) — Disvastigi esperanton en la pacaj medioj.

4-e) — Instigi la anojn al agado per ties klerigado.

5-e) — Se eble, eldoni bultenon.

Poste, la prezidanto precizigas la taskon de la perantoj: Varbi membrojn, enspezi kotizojn, informiĝi k havigi dokumentojn al la ĝ-ala sekretario, kiu diskonigos ilin, ĉu per S-ulo, per L.E.A.-presaĵoj, aŭ propra bulteno.

Fine oni esprimas la deziron ke aperu en S-ulo la adresoj de la perantoj.

LA RAPORTANTO.

SAT-anoj! pagu tuj vian kotizon por 1948; de via akurato dependas la bona administrado de nia Asocio. Prokrastita pago komplikas nian taskon k povas kaŭzi eraran interrompon en la ekspedo de la gazeto. — Vidu la novan tarifon de la kotizoj.

Internacia Lingvonormigo kaj esperanto

(Prelego en la Laborista Universitato dum la 20a SAT-kongreso en Aarhus).

Por la evoluo de la moderna teknika kulturo la normigo havas esencan signifon. La enkonduko de monunuoj estas ekzemplo de malnova normigo, alia ekzemplo estas la sama larĝeco de fervojaj reloj. Se aŭtomobilisto deziras akiri ŝraŭbon por sia veturilo, li ĉie povas havi la ĝustan grandecon — la normigo ebligas tion.

Sed se li deziras mendi la ŝraŭbon skribe, li bezonas nomon ĉie konatan por povi ĉie ekhavi ĝin — la varnormigo devas esti akompanata de lingvonormigo. La terminologioj (fakvortaroj) kaj la nomenklaturetoj (fakaj numeroj) de diversaj sciencoj donas ekzemplojn pri tia lingvonormigo internacia. En la botaniko, la zoologio kaj la medicino la latina lingvo formas la bazon por tiu lingvonormigo — en multaj aliaj sciencoj, ekz. la teknikaj, tiu lingvo ne taŭgas kiel solvo por tiu problemo.

Ĝis nun oni devis, en la plej multaj fakoj sciencaj kaj teknikaj, kontentiĝi per internaciaj vortaroj plurlingvaj, per normigo en la unuopaj lingvoj kaj kunordigo plurlingva de la rezultantaj normigitaj naciolingvaj terminaroj. Tamen oni flanke de la normigaj organizoj dum la lastaj 15 jaroj multe interesiĝis pri apliko de *internacia scienca-teknika terminologia kodo*, kaj Esp-o estis serioze pristudata kiel eventuala bazo por la ellaborado de tia kodo, t.e. ke tiukaze Esp-o ludus en la tekniko la saman rolon, kiun ludas hodiaŭ la latina en la medicino, botaniko, zoologio. Terminologia studkomiĝo de la Soveta Akademio de Sciencoj, post studo farita de specialkomitato de la soveta normiga komisiono, prezentis en 1935 projekton de tia kodo bazita sur Esp-o. Wüster, ĉefa pioniro de teknika lingvonormigo, kiu en 1931 eldonis gravan verkon pri la temo, ankoraŭ esploras la diversajn eblojn por starigi tian kodon en formo kiel eble plej racia. Ŝajnas per privata informo al mi, ke oni nun venis al la konkludo, ke Esp-o ne povas esti akceptata kiel bazo por la oficialaj sciencaj terminaroj. Anstataŭe rezultos sistemo por inter- kaj ekstrapolado de la ekzistantaj oficialaj internaciaj terminologioj. Surbaze de tiu sistemo oni devos formi la esp-ajn terminarojn, same kiel la naciajn.

Fine la preleganto priparolis la ampleksan laboron faratan de IALA (International Auxiliary Language Association) por starigo de normvortaro de internaciaj vortradikoj surbaze de studoj pri vortfamilioj kaj por ellaborado kaj objektiva prijuĝado de lingvoprojektoj. En la interlingvistiko oni distingas inter du ĉeftipoj de planlingvoj: la naturisma kaj la skema aŭ aŭtonoma. Esp-o apartenas al la lasta tipo, en kiu oni iom pli ol en la unua emfazas la simplecon de la gramatiko kaj vortformado prefere al la tujkomprenebleco. Ŝajne ankaŭ en la diskutoj pri racia solvo de la

Vivo kaj verko de KARL MARKS

IV (Fino).

La kredo de Marks, ke proletara triumfo estas preskaŭ fiksita en la kartoj de historio, ne kondukis lin al malaktiveco. Ĉiam batalante, li instruis sian sekvantaron jungi por iliaj celoj la energion de klasmalamo, kie ajn ĝi ekzistas. Sed li konsciis, ke la kondiĉoj por la revolucio ankoraŭ ne venis. La nura espero por proletara venko, kiel li vidis ĝin, estis tra tempa alianco kun la burĝaj demokratoj, ribelantaj tiam kontraŭ monarkio k aristokratio.

En 1850 Marks donis al la Komunista Ligo signifajn strategiajn instrukciojn: „En la kazo de batalo kontraŭ komuna malamiko, ne necesas iu speciala kunfandiĝo. Tuj kiam tia malamiko devas esti malkaŝe kontraŭbatalata, la interesoj de ambaŭ partioj koincidas por la momento, k kiel en la pasinteco tiel en la estonteco ĉi-tiu unio, intencita nur por la momento, formos sian propran akordon..... — la laboristoj, per sia kuraĝo, sia decideco k sia memofero ludos la ĉefan parton en la venko-gajno.

„Kiel iam, tiel en ĉi-tiu batalo, la amaso de la et-kapitalistoj konservos tiel longe kiel eble sintenon de temp-gajno, hezitemo, k malaktiveco, k poste tiel baldaŭ kiel la venko estas decidita ili prenos ŝarĝon sur sin, invitos la laboristojn esti pacaj k reveni al laboro por eviti tiel nomatajn ekscesojn por tiamaniere fortranĉi la proletaron de la fruktoj de la venko.

„Ne kuŝas en la forto de la laboristoj malhelpi la et-kapitalistajn demokratojn fari tion, sed ili povas malfaciligi ilian estrecon super la armita proletaro k dikti al ili tiajn kondiĉojn, ke la kapitalistaj demokratoj portu en si de la komenco la ĝermon de sia detruo.

„Per unu vorto: ĉe la unua momento de la venko nia malfido ne devas pli longe esti direktata kontraŭ la venkita reakcia partio, sed kontraŭ niaj iamaj aliancanoj, kontraŭ la partio, kiu serĉas ekspluati la komunan venkon por si mem..... Estas nia intereso k nia tasko fari la revolucion permanenta, ĝis ĉiuj pli aŭ malpli posedantaj klasoj estas elpelataj el la potenco, ĝis la proletaro konkeris la ŝtataŭtoritaton.

„Por ni, tio ne povas esti demando de ŝanĝo de privata posedajo, sed nur de ĝia detruo, ne de maskado pri klas-antagonismoj, sed de klas-nuligo, ne de frakaso de ekzistanta socio, sed de fondo de nova socio.”

La *manifesto* fiksas la celon: „La komunistoj..... deklaras malkaŝe, ke ilia tasko povos esti atingota nur per la perforta

problemo pri teknika lingvonormigo tiuj du principoj estas juĝataj unu kontraŭ la alia, kaj oni ne povas surpriziĝi pri tio, ke en sciencistaj rondoj la naturisma principo estas la plej alloga. Sed sendube la grado de la progreso de Esp-o havos decidan influon al la definitiva solvo de tiu problemo.

PAUL NEERGAARD.

21a Kongreso de S.A.T. en Amsterdamo!

2a komuniko.

Adreso de O:K.K.

Sekr-ino H. Oudenhoven-Bishoff, Bestevaerstraat 127, Amsterdam W, Nederlando.

Kasisto: B. Bultemeijer, Jan v. Galenstraat 86, Amsterdam-W, Nederlando.

La Kongreso okazos de sabato la 31a de julio ĝis merkredo la 5a de aŭgusto. Jaŭde kaj vendrede la kongreso ekskursos.

Kongresa kotizo: antaŭ la unua de majo por S.A.T.-anoj po 7 guldenoj, geedzoj 12 gld. ne-S.A.T.-anoj antaŭ la unua de majo po 10 guldenoj, geedzoj 17.50 guldenoj.

Post la unua de majo la kotizo respektive estos: por anoj 10 gld., geedzoj 15 gld., neanoj 13 gld., geedzoj 20 gld. Anoncu vin kaj pagu rekte al la kasisto de O.K.K.! Li ankaŭ prizorgos la loĝadon.

Oni pagu poŝtmandate aŭ pere de ĝirkonto de la komunumo Amsterdam. Ankaŭ eblas pagi poŝtĝire al „La S.A.T.-komitato S 523” p.a. B. Bultemeijer, Jan v. Galenstraat 86, Amsterdam.

LOGADO.

La intenco de O.K.K. estas, kiom eble, kontentigi la gek-dojn dezirantajn loĝi kaj tranokti ĉe esperantistoj aŭ simpatiantoj. Tamen, al tiuj kiuj ŝatas hotelon, ni jam nun sciigas, ke la prezoj ĉi tie estas sufiĉe altaj. Ili estas por tranoktado kunmatenmanĝo por tago po 3 ĝis 5 guldenoj.

La komitato klopodas aranĝi amasloĝejon. La kostojn ĝi poste mencias. Do anoncanta vin por nia kongreso, samtempe sciigu vian deziron pri loĝado. Ne forgesu aldoni sekson, aĝon kaj profesion.

Karavanoj.

Ni petas aranĝontojn de karavanoj kaj tiujn kiuj deziras informojn pri vojaĝo, sin turni al la O.K.K.

Kunvenoj frakciaj.

La diversaj frakcioj bonvolu informi nin, por ke la komitato povu bone prizorgi la deziratajn kunvenojn. Tiu ĉi instigo samtempe valoras por aranĝi fakajn kunvenojn.

Atentu! Atentu!

Baldaŭ aperos kalendareto. La prezo estos po 10 cendoj. Eksterlandanoj jam nun povas mendi kaj pagi per respondkupono. Perantoj rapidu, ĉar baldaŭ fi iĝos la jaro kaj tiam oni bezonos ĝin. Mendu por viaj sekcianoj!

falo de la tuta ekzistanta socia ordo..... Proletoj havas nenion por perdi krom siajn ĉenojn. Ili havas mondon por gajni. Proletoj de ĉiuj landoj, unuiĝu!”

Tamen, kiam Marks rimarkis la fiaskon de siaj profetaĵoj pri frua revolucio, li pasis de la varmega nepardonemo de junio al la komplikaj ekonomiaj k metafizikaj abstraktaĵoj, kiuj tiel malfaciligis la „KAPITALO'N” kelkloke. Ne ĉesante esti revoluciulo, li fariĝis pli repaciĝema al atendado k eĉ evitis la dogmon de la uni-

Sennacieca Help-Servo

(vidi la antaŭajn komunikojn).

Novaj donacoj:

- enspezitaj en Usono: K-doj M. Gencsi 1 dol., G. Spant 1 dol., Grupo en Detroit 7 dol., — Sennomulo, N.Y. 2 dol.
- enspezitaj en Paris k Roterdamo; la nomoj aperis ... la Oktobra Bulteno de SAT-Amikaro, por ŝpari lokon en S-ulo: 4.825 ff.
- enspezitaj en Paris, Roterdamo k aliloke: K-doj Piron, Paris 50 ff., — SAT. 20592 Dunkerque 100 ff., — Cassassoles, Vanves 150 ff., — Winkel, Schagen 5 Gld. — Burnelle, Herstal 50 fb., — Isnard, Marseille 100 ff., — Claudy, Lyon 100 f., — Riondolet, Sarcey 100 f., — Cachon, Eaubonne 100 ff., — Tirman, Nice 70 ff., — Chance, Reims 200 f., — SAT-Rondo Malmo 10 sv. kr., — Etienne, Paris 40 ff.
- enspezitaj en Roterdamo por pakoj al difinitaj adresoj: K-doj De Bruin, Enschede 27,50 Gld., — Bas Wels, 100 Gld., — K-ino M. Toll, Leeuwarden 60 Gld.

Ĝis la 11 septembro nia agento en Novjorko, K-do Bonesper, ekspedis 41 pakojn, kiuj kostis 401,50 dol.

Ĝis la sama dato li enspezis nur 158,67 dol.

Mankis do tiam 242,8 dol. manko, kiun K-do Bonesper ŝtopis per sia propra mono provizore.

Tre ĝenataj ni estas por eksporti al Usono la monon kolektitan en Eŭropo; ni esperas ke la vendado, en tuta Ameriko, de niaj libroj, aparte de la Plena Vortaro, k la 1948-kotizoj baldaŭ certigos la ekvilibron de tiu kaso.

Venis al ni la informo ke el la skandinaviaj landoj, — kiu ĝuas relativan abundon, — estas permesate ekspedi pakojn da nutraĵo al centra Eŭropo! Se tio estas vera, kial do la SATanoj en Danio, Norvegio, Svedio ne organizus, sub la ŝildo de SAT, help-servon apartan? Tion ili faru, almenaŭ ĝis kiam la Nov-Jorka Servo disponos sufiĉan kapitalon por agadi plenplane.

P. K. de SAT. (10 Nov. 1947)

versala, nepra neceseco de perforto, deklare, ke socialismo havos bonan ŝancon de paca naskiĝo, kie denaskaj tradicioj estas tiel konstante enradikita kiel en Nederlando, Anglio k la Unuigitaj Ŝtatoj.

La financaj zorgoj de Marks daŭris ĝis 1869, kiam Engels forvendis sian parton ĉe Ermen & Engels, transloĝiĝis al Londono, k donis al sia amiko stabilan enspezon. La romano de Karlo k Jenny ne perdis sian ĉarmon. En 1863, kiam la patrino de Marks mortis, li vizitis Trier-on k skribis al Jenny pri sia ĝojo esti demandata dekstre k maldekstre pri la „balreĝino“, la iam „plej bela knabino en la urbo“. Jenny mortis en 1881, Karlo en 1883 ĉe sia polva sciencul-pupitro, k Engels en 1895, post publikigo de la dua k tria volumo de Kapitalo. D-ro A. MILDWURF.

KORESPONDADO

Deziras korespondi:

- K-do Alfred Bachmann, Körerstr. 5 I (10b) Chemnitz, Soveta z. Germanio pri laborista movado, interŝ. pŝmk. por kursanoj.
- K-do Karl-Heinz Mothes, Bahnhofstr. 19, (10b) Schwarzenberg/Erzged. Soveta z. Germanio, koresp. k ŝ poŝtmk.
- K-do Franz Brüchert, Ebertystr. 20 Stfl. I, (1) Berlin O 34, Germ. korespd. kun ĉ.l. pri ekonomiaj, politikaj, socialaj k aliaj seriozaj temoj.
- K-do Willy Gross, Gartenwg 4 (10b) Lubniz ü Wrdau/Sa, Soveta Germ. Koresp. pri div. temoj kun ĉ.l. Alvokas la K-dojn Koiviisto, (Finnlando), G. Clairet (Francio), P. Sumilov, P. Prohin, I. Jersov, I. Volkov, R. Mjalk, A. Madjukov en Sovetio, daŭrigi la koresp.
- K-do Johs. Voigt, Siedlerweg 30, (10b) Oberfrahna/Sa., Soveta z. Germ. kor. kun ĉ.l. let. k poŝtk.
- K-do Arthur Schulze, Kolonie Waldesrieden, 77 (1) Berlin-Lübars, Germ. koresp. kun veraj socialistoj ĉ.l. pri la situacio de tutmonda laboristaro.
- Fratoj Helmut k Günter Tautz, (17 k 14 jaraj), (10b) Grüna/Sa., Ringstr. 2 Soveta z. Germanion dez. kor. kun samaĝuloj pri divers. temoj.
- K-ino Hedwig Rappe, Hannover-Ricklingen (20a), Grünlide 8, Germanio, dez. kor. kun ĉ.l.
- La A.E.F.-grupo „Verda Stelo“, Wien 5, aranĝas letervesperon. Bonvolu sendi leter. k poŝtk. el la tuta mondo! Ni certe respondos! Adreso: K-do Alois Grabner, Wien 5, Bräuhausegasse 73/4, Aŭstrio.
- K-do Hans Mickstätter, Linz-Urfahr, Hagenstr. 15/I, Aŭstrio, dez. koresp. kun ĉ.l., precipe kun Svedio, Danio, Finnlando k Ĉeĥoslovakio pri ĉ. temoj.
- K-do Walter Wiedemann, Karl Marx-Platz 7, 10b Burgstädt/Sa, Germanio kun ĉ.l. geK. pri laboristaj temoj.
- K-do Max Fritzsche, Lindenstr. 40, 10b Burgstädt/Sa, Germanio, kun ĉ.l. geK. pri diversaj temoj.
- K-do Erich Rohr, 2 Weissack Kr. Lukau Post Walddrehna, Germanio, pri ĉ. temoj, ankaŭ franclingve. Edzino lia koresp. pri mantrikado k kolektas ĵurnalojn. Lia 11-jara filino k 7-jara filo koresp. kun infanoj.
- K-do Kunert Josef, Peterswörth 64, Dillingen/D, Germanio, dez. interŝ. p.m. k p.k. il. kun ĉ. landoj k koresp. pri ĉ. temoj.
- K-do Hermann Wagner, Relenbergstr. 2, Stuttgart-N, Germanio, konigas sian novan adreson.
- K-do Bruno Meyer, Plantagenstr. 1, (10b) Burgstädt, Germanio, dez. koresp. pri ĉ. temoj, precipe pri arto (artopentristo).
- K-do Hartig, Fritz, Teichstr. Behelfsheim 4, (10b) Burgstädt/Sa, Germa-

Helpo al Sennaciulo!

K-do Cachon, Eaubonne 5 Off.; Rofo, Paris 10 Off.; K-do H. J. de Rover 12½ ŝil; Viktor Planman, Amal 7 sv. kr.; Cuny, Paris 120 ff.; Kanjar, Paris 107 ff.; Martinez Th. 18 ff.; Novion, Paris 100 f.; J. Schijf, Woubrugge gld. 1,60; F.L.E., Sekcio Rotterdam 3 gld. 7,50

Ni kore dankas!

La maristoj kaj Espo

K-do S. Otsen, Dirk Hartoghstr. 9, Amsterdam, informas ĉiujn maristojn, kiuj scipovas esp-on, ke en majo '48 okazos la unua postmilita renkontiĝo de esp-maristoj en Fécamp (Francio), Oni skribu por partopreno aŭ por deziroj al Delamare, 32, str. Alex-Legros, Fécamp (Seine-Inferieure), Francio.

Plie oni celas dum la kongreso de SAT en Amsterdamo okazigi kunvenon por la maristoj, kiuj estas petataj sendi siajn adresojn al k-do Otsen. Ĉiuj maristaj esp-istoj estu membroj de la faka grupo en SAT! ...

nio pri div. temoj.

- K-do Arthur Pester, Fabrikstr. 1, (10b) Muhlau ü Burgstädt/Sa, Germanio pri div. temoj.
- K-do Max Schade, Leckwitzerstr. 1, (10a) Strehla/Elbe, Germanio, serĉas malnovajn koresp. siajn.
- K-do Johann Haupt, 19b Stecklenberg/Ostharz, Kr. Quedlinburg, Germanio ŝtate ekzamenita instruisto de Esperanto (iam en Zwittau C.S.R.) serĉas iamajn konatulojn k dez. kor. kun ĉiul. K-doj.
- K-do Hans Gabler, Elisenstr. 80 III, 10b Leipzig S 33, Germanio, kun ĉ. landoj, p. ĉ. t., ĉefe historio, relig., geogr., arto, literat. k naturscienco.
- K-do Werner Sellmann, Siedlung Felchta 1, 15a Muhlhausen/Thür., Germanio, dez. kor. letere, interŝ. pŝmk.
- K-do Georg Huther, v. Hauckstr. 8, Miltenberg/Main, (1a3) Germanio, dez. kor. kun franco pri ĉ. temoj. sociaj k pacaj problemoj.
- K-do Hans Flassbeck, Magdalenenstr. 48, (22c) Bonn a. Rhein, Germanio dez. kor. pri social. Filoz. relig. temoj.
- K-do Karl Eberwein, (13a) Eyb ĉe Ansbach/Mfr. Haus 95, Germanio, dez. kor. per il. poŝtk. interŝ. poŝtm. kun ĉ.l.
- K-do Petro Jayer, Paris, dankas al la mult. german. K-doj kiuj skribis al li. Pro manko da tempo k tro altaj poŝtelsp. petas senkulpigon ĉar ne povas respondi al ĉ.
- K-ino J. Sebire, Cité de Caudet, Falaise, (Calvados) Francio, 22jara dez. anglan korespondant(in)on samaĝan por kor. k kiu min akceptus senpage 1 monaton en 1948. Same mi gastigos senpage hejme.
(Al tiuj, kies adreso ankoraŭ ne aperis, ni petas pardonon. Sendube ni povos kontentigi ilin baldaŭ.)

